

Theodor Storm,
Bonan nokton

tradukita de Manfredo Ratislavo

Sonoras tra l' kvieto²
Batad' de sonoril'.
Nun ,Bonan nokton!' Dormu
Ĝis morgaŭ en trankvil'!

Infano via kuŝas
En la lulilo, mi
Ĉeestas, ĉio via
Ja estas ĉirkaŭ vi.

Ankoraŭfoje diru
Ni ,Bonan nokton!' nun!
La Di-Sinjor' nin gardos,
Kaj lumas jen la lun'.

*Traduko de la Germana poemo "Gode Nacht" de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, *1817-09-14 - †1888-07-04) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2002-11-05.*

MR-389-4 / Arg-202-401 (2004-03-06 07:02:31)

Mi trovis tiun ĉi poemon en la libro „Theodor Storm - Werke“ eldonita de la eldonejo Droemersch Verlaganstalt München por la Germana Libroklubo (Deutscher Buchklub Bochum) en la jaro 1954.

²Aŭ eble:
Klarsonas jen tra l' kvieto